# *Misio de la monda fonduso internacia kontrolas plenumon de siaj postuloj en Argentino.*




Bonaero, 9 nov (RHK) La misio sendita de la Monda Fonduso Internacia alvenis al Argentino por kontroli la starigon de la al?ustigoj necesaj flanke de la registaro de Mauricio Macri.

La teamon prezidas la estro de la teknika skipo de la institucio, Roberto Cardarelli, kiu renkonti?os kun la sekretarioj de ekonomia politiko, Miguel Braun kaj de Financoj, Rodrigo Peña, la? raportis Telesur.

La laboro de tiu misio estas kontroli la uzon donitan de la registaro al la mono donita de la internacia organo, krom superrigardi la bu?eton de 2019 kun la celo ke estu plenumita la promeso de nula deficito.

Nova misio alvenos al tiu lando en decembro, kaj dume la registaro devas garantii kaj montri la progresojn en la plenumo de la interkonsento subskribita inter amba? partneroj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/176100-misio-de-la-monda-fonduso-internacia-kontrolas-plenumon-de-siaj-postuloj-en-argentino

# Radio Habana Cuba